


BRAZILA ESPERANTISTO

59-A JARO

NOVEMBRO-DECEMBRO 1965

N.º 620-621



19-a BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO

RIO DE JANEIRO, — 1965



Solena Malferma Kunsido en Palaco de Kulturo.

NOVEMBRO-DECEMBRO 1965

59-a Jaro

N.º 620-621

BRAZILA ESPERANTISTO

("O Esperantista Brasileiro")

Oficiala organo de

BRAZILA ESPERANTO-LIGO

Societo de publika utileco, laŭ registara

dekreto N. 4356, 26 Oktobro 1921

Direktoro:

A. CAETANO COUTINHO

Respondeca redaktoro (redactor principal):

D-ro CARLOS DOMINGUES

Administracio kaj Redakcio:

Praça da República, 54, 2.º

Telefone: 42-4357

Sidejo de la Brazila Societo de Geografio

RIO DE JANEIRO — BRAZIL

Senpaga por anoj de **B. E. L.**

Eksterlande: 15 steloj aŭ 10

respondukuponoj

QUOTA ANUAL DE ADESÃO À LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO 1966

(De acordo com os Estatutos todos os membros são automaticamente filiados à organização mundial)

Membro simples: recebe a carteira de sócio, os cupões de serviço e o "Brazila Esperantisto"	4.000
Membro com direito ao Anuário: recebe o mesmo que o antecedente e mais o Anuário do movimento esperantista	10.000
Membro Assinante: recebe o mesmo que o antecedente e mais a revista "Esperanto"	20.000
Membro Mantenedor: recebe o mesmo que o Membro Assinante	30.000
Patrono: recebe o mesmo que o Membro Assinante e paga 10 vezes a quota deste.	
Membro Vitalício: recebe o mesmo que o Membro Assinante e paga 20 vezes a quota deste.	

Todas as importâncias devem ser remetidas em cheque pagável no Rio de Janeiro à

LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO
PRAÇA DA REPÚBLICA, 54, 2.º
Rio de Janeiro, GB

MATERIAL DO 19.º CONGRESSO BRASILEIRO DE ESPERANTO

Rio de Janeiro, 16 a 23 de Outubro de 1965.

TRA LA MONDO

O Problema do Idioma Internacional pelo Prof. J. B. Mello e Souza 200

ANTIKVAJ PEJZAĜOJ DE RIO DE JANEIRO
ilustrado 200

LA ESPERO

Hino Esperantista

Letra e música. Acompanhado de tradução da poesia pelo Prof. J. B. Mello Souza 200

CARTÕES POSTAIS

Com vistas da cidade e legenda em Esperanto 200

LAPIS

Com dizeres alusivos ao Esperanto 100

RUI BARBOSA

Cartão com reprodução da tela de Portinari na Córte Internacional de Haia e com a tradução em Esperanto do famoso CREDO 100

Desconto de 20% para os grupos em encomendas superiores a 10.

EDIÇÕES BRASILEIRAS

Método Elementar de Esperanto-Pastorino	800
Rui Barbosa — Nery-Joels	1.000
Elektitaj Poemoj — Castro Alves — Knoedt	2.000
Zamenhof — Iniciador de Esperanto — Luna-Domingues	1.000
Teatro — Machado de Assis	800
Esperanta-Portugala Proverbaro, Amo Per Proverboj — Zamenhof, C. Fernandes, A. Azevedo	1.200
Curso de Esperanto em 20 lições, 7.ª edição	800

BRAZILA ESPERANTISTO

59-A JARO

NOVEMBRO - DECEMBRO 1965

N.^o 620-621

MESAĜO AL LA 19-a BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO

PROF. D-RO IVO LAPENNA, PREZIDANTO DE U. E. A.

Estimataj Sinjorinoj kaj Sinjoroj,
Karaj Geamikoj,

Kun granda plezuro mi sciĝis, ke en la oficiala kadro de la festoj por memori la kvaran jarcenton de Rio de Janeiro okazas ankaŭ la 19-a Brazila Kongreso de Esperanto.

En la nomo de Universala Esperanto-Asocio kaj en mia propra mi havas la honoron direkti al la bela urbo Rio, al ĝia Urbeŝtaro kaj la tuta loĝantaro plej koran gratulon kaj bondezirojn por la estonteco, kiu estu same brila, kiel estis la pasinteco. Al la Brazila Kongreso de Esperanto kaj al la tuta Brazila Esperantistaro mi sendas la sentojn de profunda amikeco, kiu ekflamis tiun serenon kaj sunan tagon en 1954, kiam survoje al Montevideo mi havis la privilegion ĝui la gastamon kaj senfinan ĝentilecon de ĉiuj kiujn mi renkontis.

En ĉiu lando — oni eĉ povus diri en ĉiu unuopa loko — la Esperanto-organizaĵoj de diversaj tipoj frontas specifajn problemojn, kiuj estas ligitaj al la landaj, regionaj aŭ eĉ lokaj cirkonstancoj. Krom tiuj apartaj problemoj, ekzistas ĝeneralaj, kiuj koncernas la Esperanto-Movadon en la tuta mondo. Ili estas multnombraj: iuj pli gravaj, aliaj malpli

signifaj. Kaj ili diktas senĉese novajn taskojn, kiuj postulas la aktivan helpon de ĉiuj organizaĵoj kaj de ĉiuj unuopuloj. En la nuna momento, la plej grava kaj la plej urĝa tasko de la Internacia Esperanto-Movado estas la kiel eble plej kompleta realigo de la Laborplano de U.E.A. okaze de la Jaro de Internacia Kunlaboro.

Tiu Laborplano, jam vaste diskonigita, antaŭvidas tri grupojn da aktivecoj, ĉiu kun nombro da punktoj kaj eroj.

Al la unua grupo apartenas la agadoj celantaj diskonigi la Jaron de Internacia Kunlaboro, la pozitivajn atingojn de Unuigintaj Nacioj kaj de diversaj specialigitaj organizaĵoj, la nunajn klopodojn de UNO precipe sur la kampoj de ekonomia interhelpo, de scienco, edukado kaj kulturo. La dua grupo rilatas al la intensigo de internacia kunlaborado pere de la Internacia Lingvo per artikoloj kaj radio, publikigo de pliaj reprezentaj verkoj en la serio Oriento-Okcidento, prelegoj, konferencoj, seminarioj, kongresoj kaj aliaj metodoj sugestitaj en la Plano. La tria grupo de agadoj koncernas la utiligon de la Jaro de Internacia Kunlaboro por amasa disvastigo de la Internacia Lingvo ĉie en la mondo per objektiva informado

pri ĝia valoro kiel instrumento de komunikado kaj pri ĝia signifo por la amikaj rilatoj inter la popoloj kaj la monda paco.

La kerno de tiu lasta agadgrupo estas la propono prezentota fine de tiu ĉi jaro al Unuigintaj Nacioj. Laŭ la informoj, ricevita en la Centra Oficejo de U.E.A. ĝis la 26-a de junio — la datrevenon mem de la subskribo de la Ĉarto — entute subskribis la Proponon 177.433 individuaj personoj kaj 906 organizaĵoj kun 25.677.655 membroj. Inter la individuaj subskribintoj troviĝas la Prezidanto de Aŭstrio s-ro Franz Jonas, mem aktiva esperantisto, trideko da ministroj, multaj sciencistoj, akademianoj, profesoroj, instruistoj, verkistoj kaj aliaj profesiuloj. Gravaj kulturaj organizaĵoj kaj potencaj laboristaj sindikatoj same tiel subskribis la Proponon. Novaj folioj kun subskriboj de unuopuloj kaj organizaĵoj ĉiutage amase alvenas en la Centran Oficejon de U.E.A. el ĉiuj mondopartoj, tiel ke la finaj rezultoj tutcerte estos vere imponaj. Tio sendube fortikigos la poziciojn de Esperanto en la mondo kaj signifos plian grandan paŝon antaŭen al la celo: la ĝeneraligo de la uzo de Esperanto en la internaciaj rilatoj kiel la sole ebla racia kaj justa solvo de la lingva problemo kiu prezentas unu el la ĉefaj obstakloj al vastigo kaj intensigo de internacia kunlaborado.

Mi esperas, ke la Kongreso dediĉos sian atenton ankaŭ al tiu aspekto de niaj komunaj klopodoj kaj ke la tuta Brazila Esperantistaro kontribuos ĝis maksimumo al la plena sukceso de la Jaro de Internacia Kunlaboro, kiu samtempe estas ankaŭ la Jaro de la Internacia Lingvo Esperanto.

PROPOSTA À ONU

A COLETA DE ASSINATURAS TERMINARÁ EM JULHO

Prossegue em todo o mundo o animado trabalho de coleta de assinaturas para a petição monstro, que será apresentada à ONU em favor da Língua Internacional.

Os resultados mostram-se compensadores e capazes de influenciar a máxima organização internacional.

Também do Brasil chegam listas em que figuram pessoas de todas as categorias sociais, inclusive Governadores, Prefeitos, Parlamentares, Vereadores, Reitores de Universidades, Prelados, Magistrados e muitas outras personalidades.

Até agora mais se distinguiram nessa louvável tarefa os Srs. Prof. Paulo Amorim Cardoso de Fortaleza, Capitão José Rabello de Paula e Alfredo Maceira Rodriguez do Rio de Janeiro, Prof. Francisco Corrêa Netto de Niterói e Vivaldo Marcelino da Silva de Campos.

Muitas instituições já firmaram, pelos seus representantes, o importante documento. Vivamente recomendamos a obtenção de novas adesões sobretudo neste particular.

O prazo terminará, para o Brasil, em 15 de Julho próximo.

Kun tiu espero, enpense kun vi, mi ankoraŭfoje salutas vin tutkore kaj deziras al ĉiu el vi persone feliĉon kaj al via laboro plenan sukceson.

LA 19-A EN LA 400-JARA

La 19-a Brazilia Kongreso de Esperanto, per kiu la esperantistoj festis la 400-an Jarcenton de Rio de Janeiro, atingis plenan kaj brilan sukceson. Kongresanoj el preskaŭ ĉiuj ŝtatoj venis al la tiel nomata "Urbo Mirinda", kiun ĉiuj brazilanoj amas vidi aŭ revidi. Kelkaj alilandaj samideanoj donis al la kunveno iom internacian koloron.

La Prezidanto de la Respubliko, Marŝalo Humberto de Alencar Castelo Branco, akceptis la Honoran Prezidantecon de la Kongreso. La Rektoroj de la tri Universitatoj en Rio de Janeiro — la Federacia, la Ŝtata kaj la Katolika — donis sian apogon al la Kongreso: Rektoro Haroldo Lisboa da Cunha estis la oficiala parolanto en la Solena Malferma Kunsido kaj Rekoro Pedro Calmon prezidis la Solenan Ferman Kunsidon.

Sabaton, la 16-an de Oktobro 1965, esperantistoj el preskaŭ ĉiuj brazilaj ŝtatoj kaj gesamideanoj el Argentino kaj Urugvajo kunvenis je la 15-a en la sidejo de BEL interkonatiĝe kaj prepare por la XIX-a Brazilia Kongreso de Esperanto.

La Prezidanto de la Organiza Komitato, Prof. J. B. Mello e Souza, salutis kaj bonvenigis la kongresanojn, kaj proponis Kongresan Estraron:

Prezidanto: Gen. Geraldo Pádua

Unua Vicprezidanto: Prof. Antenor Nascimentos

Dua Vicprezidanto: Prof. Cândido Jucá, filio

Tria Vicprezidanto: S-ro Murilo Araújo

Generala Sekretario: S-ro Luiz Alberto Martins

Unua Sekretario: F-ino Josefina Schembri

Dua Sekretario: Kol. Jorge Campos de Oliveira

La serio de kvar fakaj prelegoj en Esperanto estis nova kaj grava programero en la Kongreso, kiun la Kongresanoj varme aplaudis.

La specialaj kunvenoj de Kursgvidantoj, de Delegitoj kaj de Grupestroj vekis grandan intereson kaj kunvenigis multnombrajn koncernulojn, kiuj vigle diskutis utilajn temojn.

La diversaj diservoj altiris grandan publikon kaj ne nur de samreligianoj. En ĉiuj preĝejoj oni parolis en Esperanto aŭ pri Esperanto.

Entute la etoso de la Kongreso estis altnivela, samideana kaj kora. Al tiu rezultato multe kontribuis ne nur la prepara laboro de la Organiza Komitato, sed la lerta kaj inteligenta direktado de la Estrara Kongreso, precipe de ties Prezidanto, Generalo Geraldo Pádua.

La propono estis aklame akceptita kun tuj posta enoficiĝo de la Estraro.

Por la tri Specialaj Komisionoj, difinitaj de la Regularo por la Brazilaj Kongresoj de Esperanto, estis elektitaj:

a) Tezoj — S-ro Antônio Pádua Soares (PI), D-ro Hyzo Gondemberto dos Santos (PR) kaj Leüt. Carlos Henrique Dionísio (RS).

b) Proponoj — S-ro Helmuth Schenk (SP), Kap. Godofredo de Araújo Goes (BA) kaj S-ino Augusta Bougelet de Sousa (RJ).

c) Redakto — Prof. Paulo Amorim Cardoso (CE), Prof. J. M. Mabeoone (PE) kaj S-ro Paulo Vieira da Silva (DF).

La kunveno finiĝis per surpriza disdonado de bonegaj cigaroj, speciale donacitaj de la fabriko Suerdick pere de nia tre sindona kaj vere simpatia samideano Prof. Vivaldina M. Caymmi, el Bahía.

En la mateno la kongresanoj vizitis ĝiĉeton de la Centra Poŝtofiĉejo, kiu lanĉis memorigan stampilon.



Inaŭguro de la filatela ĝiĉeto.

Dimanĉon, je la 9-a, kara D. João Cavati, titola Episkopo de Eŭkarpio, celebris meson en Esperanto por la katolikoj en la monumenta Preĝejo Candelária. Ankaŭ la predikon li faris en Esperanto. Helpis al la meso salezia Pastro Roque dos Santos, el Ponte Nova, Minas Gerais. La bonega Oficiala Ĥoro de la Nacia Lernejo de Muziko, sub la Direkto de Prof-ino Teresinha Schiavo kaj akompanata per orgeno de Prof-ino Maria L. Campelo Ribeiro, aŭdigis religiajn kantojn. La Esperanta teksto de la meso estis disdonita al la publiko, kiu tiel povis partopreni en la Diservo. Je la unua fojo en Brazilo meso estis farita en la Internacia Lingvo, laŭ la normoj starigitaj de la nuntempa Universala Koncilio. Kvankam temis pri neneŭtrala, flanka aktiveco de la Kongreso, adeptoj de la aliaj religioj ĉeestis omaĝe la katolikan meson, belega monstro de vera kunfratiĝo, kiun la katolikoj poste reciprokis per ĉeesto al la aliaj kultoj.

Posttagmeze en la Presbiteriana Katedralo Pastoro Tancredo Costa gvidis evangelian kultron por esperantistoj kaj ĉarmegis ĉiujn per klera kaj tre elokventa parolo. Kunhelpis al la Diservonia samideano S-ro Joaquim Mendes da Rocha. Brile parolis la Prezidanto de la Kongreso kaj finis dirante en Esperanto la preĝon "Patro Nia".

Lundon matene Gen. Geraldo Pádua faris prelegon en Fundação Getúlio Vargas pri la Unuigintaj Nacioj. Memoriginte ties originon kaj celon, li atentigis pri la graveco de la rilatoj inter UEA kaj Unesko kaj pri la valoro de la Peticio amase subskribata de la tutmonda esperantistaro.

Tuj poste Inĝeniero Alberto Flôres prelegis pri Siderurgio, pritraktante la problemon tre plaĉe kaj klare. Estas ĉiama plezuro por la esperantistoj konstati, kiel taŭga estas la lingvo internacia por teknikaj aferoj.

Vespere en Palaco de Kulturo (Ministerio de Edukado) okazis la Solena Inaŭguro. Specialaj invititoj al la estrata tablo estis D-ro Carlos Domingues, prezidanto de BEL, Episkopo João Cavati, D-ro Haroldo Lisboa da Cunha, rektoro de la Universitato de Guanabara, la famkonata filologo Prof. Antenor Nascentes, Prof. Otton Costa, prezidanto de la Beletristika Akademio de Rio de Janeiro, Prof. França Campos, reprezentanto de la Sekretario de Edukado kaj de la Stata Konsilantaro de Edukado, D-ro Leonel Gonzaga kaj Ambasadoro Rui Pinheiro Guimarães, du veteranaj esperantistoj, Gen. Guilherme Müller, reprezentanto de la Brazila Geografia Societo kaj la ŝatata poeto Murilo Araújo. La reprezentantoj de la najbarlandaj kaj lokaj Esperanto-movadoj okupis la unuan vicon de la seĝoj.

La kunsido malfermiĝis kun starigo de la kongresanoj por aŭskulti la Nacian Himnon, ludatan de muzikistaro



La Ĥoro en Preĝejo Candelária.

de la Ministerio de Mararmej Aferoj. S-ro Paulo Vieira da Silva legis specialan saluton de la esperantistoj el Brasília kaj S-ro Albertino Alves de Almeida faris saluton al Zamenhof. Tiam la Ĝenerala Sekretario laŭtlegis la salutojn, senditajn de alilandaj Esperantaj Asocioj, kaj la salutleterojn de la Leĝdona Asembleo, de la Sekretario de Edukado kaj de la Rektoro de la Universitato de Bahia, de la Urbestro de Salvador kaj de la Rektoro de la Universitato de Ceará. Per magnetofona sonbendo disaŭdigis saluto de UEA al la Kongreso, sendita de Prof. D-ro Ivo Lapenna. Sekve estis aŭdita la oficiala saluto de la Prezidanto de BEL al la kongresanoj.

Prof. D-ro Haroldo Lisboa da Cunha, rektoro de la Universitato de Guana-



Prediko en la Presbiteriana Katedralo.

bara, faris la festparoladon, esprimante siajn konceptojn kaj favoron rilate al la lingvo internacia.

Ce la fermo de la kunsido la kongresanoj denove starigis por respektoplene aŭskulti la Himnon "La Espero", salute al la tutmonda esperantistaro.

Mardon je la 9-a kunsidis la delegitoj de UEA en la sidejo de BEL. Ĉeestis S-ro José de Oliveira Gama, Kap. Godofredo de Araújo Goes, S-ro Helmut Schenk, D-ro J. M. Mabesoone, S-ro Ary Zamora, S-ro Jorge Hess (el Argentino), F-ino Guiomar Amélia de Aquino, F-ino Edina de Barros Reis, S-ino Augusta Sellmeister Bueno, S-ro Paulo Vieira da Silva, D-ro Francisco José Soares Portugal, S-ro Gert Dru-

cker, S-ro Carlos Henrique Dionísio, S-ro Antônio Pádua Soares, S-ro Aderaldo Rocha, S-ro Leônidas Silva, S-ro Hermes Pitta, S-ro Armindo Trarbach, S-ro Vivaldo M. da Silva, D-ro Hyzo Gondemberto dos Santos, F-ino Josefina Schembri, D-ro Carlos Domingues kaj Gen. Geraldo Pádua.

La kunsidantoj pridiskutis plurajn problemojn, kiuj sin prezentas al delegitoj en la plenumado de iliaj devoj, kaj interŝanĝis utilajn sugestojn.

Kun profunda doloro por ĉies koroj tiam diskoniĝis, ke mortis nia kara samideanino Edith Wehrs sekve de akcidento, suferita en la antaŭa vespero survoje al la Solena Inaŭguro.

La Kongreso forigis la programeron — vizito al aŭtoritatuloj — kaj anstataŭe difinis komision por ĉeesti la enterigon de la amata samideanino, kiu portis ĝian insignon kun si en la tombon. Per siaj lastaj vortoj Edith Wehrs petis, ke la malĝojiga okazaĵo neniel pagligu la brilon de la XIX-a Brazila Kongreso de Esperanto.

Merkredon matene la kongresanoj estis veturigataj surmare en komforta aviso ĝentile disponigita al ili de nia glora Mararmeo. La vetero tre favoris, kaj Golfeto Guanabara povis malkaŝi ĉiujn siajn ĉarmojn, ravigante precipe la aliŝtatanojn.

Je la 16-a en Kolegio Petro II Prof. J. B. Mello e Souza, nun la sola brazilano senpere parolinta al Zamenhof, tre sprite kaj plaĉe rakontis siajn travivaĵojn dum la VI-a UK en Washington. La Ĥora Ensemblo de la Kolegio belege kantis en Esperanto neforgeseblajn karnavalajn kanzonojn.

Jaŭdon matene en Fundação Getúlio Vargas Ing. Floriano Pessoa ricevis varmegan aplaŭdon pro sia prelego pri "Petrolo". Ĉiuj multe lernis pri tiu vere aktuala demando.

La junulo Francisco S. Wechsler forte impresis la aŭskultantaron per sia parolo pri "La Esperanta Literaturo".

Posttagmeze la Nacia Instituto de Eduka Kinematografo prezentis tri bonajn filmojn, parolantajn en Espe-

ranto: "Jen Aŭstralio" (aŭstralio), "Bonvenon al Oslo" (norvega) kaj "Fiat 850" (itala). La filmoj estis disponigitaj al BEL respektive de la Aŭstralio, Norvega kaj Itala Ambasadorejo.

Vespere la konata edukejo "Externato Angelorum" regalis la kongresanojn per mirinda Arta Horo. Multaj certe bedaŭris kun sincero, ke ili ne apartenas al la nuna, tiel vigla generacio de gejunuloj...

Vendredon la instruistoj de Esperanto kunvenis en la sidejo de BEL je la 9-a, kaj pritraktis ĉefe la demandojn pri metodo, interŝanĝante tiurilatajn spertojn. S-ro Jair Sales, juna esperantisto, parolante pri la meminstruado, forte impresis ĉiujn per varmega entuziasmo.

Ankoraŭ en tiu mateno okazis la Oratora Konkurso. La premiojn gajnis respektive D-ro Carlos Doin, S-ro Amarilio H. de Carvalho kaj Prof. Paulo Amorim Kardoso.

Je la 14-a ĝenerala laborkunsido en la sidejo de BEL pridiskutis proponojn de S-ro Cícero Pimentel, S-ro Alberto da Cruz Bonfim, Prof. J. B. Mello e Souza kaj Gen. Geraldo Pádua, kaj aprobis jenajn Rezoluciojn:

a) *Libroservo* — Admoni la esperantistojn ĝenerale kaj aparte la delegitajn de UEA rigardi pli serioze la libroservon; rekomendi pli viglan informadon pri la nove aperintaj verkoj;

Konsili la vendigon de elementaj lernolibroj kaj de libroj pri Esperanto al komercaj librovendejoj; peti, ke la fakulaj esperantistoj interesiĝu pri la disvendo de teknikaj libroj.

b) *Lingvoj en duagrada lernejo* — Esprimi la deziron, ke estu forigita la devigeo en la lernado de alinaciaj lingvoj en brazilaj duagrada lernejoj; ilin lernu sendevige kaj elekte tiuj, kiuj volos;

Peti urĝan plivigligon de la instruado de Esperanto en la dua periodo de la mezgradaj kursoj.

c) *Regularo por Brazilaj Kongresoj de Esperanto* — Sugesti, ke plejeble baldaŭ BEL reformu la Regularon por la Brazilaj Kongresoj de Esperanto, aprobitan en Ĝenerala Ordinara Kunsido,



Inĝ. Alberto Flores prelegas.

okazinta en la 10-a de januaro 1959, tiel ke ĝi tre precize kaj detale difinu ĉiujn aktivecojn de la BK kaj estu pli simila al samcela regularo de UEA kun la efektive necesaj ŝanĝoj, postulataj de la nacia karaktero de niaj Kongresoj.

En la vespero la kongresanoj vizitis la Sinagogon, speciale invitate de la Ĉefrabeno D-ro Henrique Lemle, kiu gvidis kulton omaĝe al ili.

Sabaton je la 9-a la kongresanoj kunvenis en la sidejo de BEL por honori la memoron de Inĝ. Alberto Couto Fernandes. S-ino Maria Almada legis biografiajn notojn pri la solidiginto de la Esperanto-movado en Brazilo, al kiu ni ŝuldas la favoran situacion da la lingvo internacia en nia lando. S-ro Luiz Alberto Martins legis verkajon de Prof. D-ro Carlos Domingues pri Couto Fernandes; ĝi aperas en alia paĝo.

Poste sekvis amasa vizito al Tombejo S. Johano la Baptisto, kie ĉiuj silente staris minuton memore al Inĝ. Couto Fernandes kaj alian minuton memore al Ĉefjuĝisto D-ro Jácome Martins Baggi de Araújo, la unua batalinto por Esperanto en Brazilo.

Vespere en la Nacia Lernejo de Muziko (Universitato de Brazilo) la kongresanoj ravite ĝuis la altnivelajn "Artajn

Momentojn", majstre organizitajn de Prof. Marlice B. Belleza kaj Jacyra M. Vianna kun la kunlaboro de Horsocieto de Instruistoj de Ŝtato Rio de Janeiro. Superbonaj la deklamadoj kaj neforge-seblaj la kant- kaj muzikprezentadoj. Estis grandioza la *Alvoko en Defendo de la Patrujo* de Vila Lobos, apotezo kun orkestro kaj kanto, kiu estis prezentita kiel omaĝo al BEL.

Dimanĉon matene la Registaro de Ŝtato Rio de Janeiro, pere de D-ro Joaquim Couto, montris sian belan Ĉefurbon Niterói al la kongresanoj per ĝuinda omnibusa veturado. Bone impresis ĉiujn la afabla maniero, kiel la armeaj Fortikaĵoj Graguatá kaj Barão do Rio Branco, akceptis la esperantistojn.

Je la 15-a en la Brazilia Spiritisma Federacio la kongresanoj estis omaĝitaj en speciala kunsido. Bele parolis D-ro Carlos Doin, kiu estas sendube unu el niaj plej elstaraj oratoroj. Danke parolis la Prezidanto de la Kongreso. Prezidis la kunvenon D-ro Armando de Assis.

Vespere en Domo de Povoanoj folklor-festo efike kontribuis al brilo de la XIX-a Brazilia Kongreso de Esperanto kaj plivigligis nian simpatian por la portugaloj, niaj karaj prapatroj.

Lundon matene okazis laborkunsido de la estroj de la lokaj Esperanto-movadoj, kunvenintaj en la sidejo de BEL.

Brazilia Esperanto-Ligo prezentis raporton pri siaj aktivecoj.


1) *Membraro* — El la 32.187 membroj, kiujn 83 landoj aligis al UEA en 1964 nia lando kontribuis per 1.094 (pli ol 3%). Por komparo: la hispanamerikaj landoj aligis entute 459; Usono kaj Kanado kune enskribis 828.

2) *Internacia Konkurso* — Brazilo venkis la Internacian Konkursan de UEA en du sinsekvaj jaroj — 1951 kaj 1952 — fakto neordinara en la Movado.

3) *Delegitoj* — El la 3.433 delegitoj de UEA 186 (5%) estas en nia lando, kiu okupas la okan lokon en la unua serio de nacioj.

4) *Stratoj* — El la 238 stratoj kun nomo Zamenhof aŭ Esperanto en 21 landoj 37 estas brazilurbaj. Brazilo okupas la duan lokon tuj post Francujo kun 44.

5) *Filiitaj asocioj* — Ĉi-jare filiigis al BEL la jenaj lokaj grupoj kun respektivaj nombroj de membroj: Brazila Klubo "Esperanto", 113; Esperanto-Societo de Minas Gerais, 53; Esperantista Societo de Pôrto Alegre, 26; Esperanto-Societo de São Leopoldo, 20; Uberlândia Esperanto-Klubo, 17; Associação Capixaba de Esperanto, 15; Associação Pernambucana de Esperanto, 13; Associação Brasileira de Esperanto, 11; Centro Esperantista de Santos, 10; Rezende Esperanto-Klubo, 8; Ceará Esperanto-Asocio, 8; Associação Baiana de Esperanto, 8; Niterói Esperanto-Klubo, 8; S. Paulo Esperanto-Asocio, 8; Esperanto-Klubo Zamentof, 8; Paraná Esperanto-Asocio, 8; Grupo Esperantista de Limoeiro do Norte, 6; S. Lourenço Es-



En la mara ekskurso.

peranto-Grupo, 6; Clube Esperantista Juiz de Fora, 5; Volta Redonda Esperanto-Klubo, 5; Grupo Esperantista F. V. Lorenz, 5; Caratinga Esperanto-Grupo, 4; Esperanto-Grupo João Ernesto, 4; Verda Stelo Esperanto-Societo, 4; Verda Stelo Esperanto-Grupo, 2; kaj Esperanto-Rondeto, 1.

6) *Revuo* — Kun "The British Esperantist", "Esperanto", "La Espero", "Espero Katolika" kaj "Svisa Espero" la revuo "Brazilia Esperantisto" estas unu el la plej malnovaj en la Movado. Ĝi regule aperis depost 1907.

7) *Biblioteko* — BEL posedas la plej riĉan bibliotekon en la tuta Kontinento kun multaj verkoj jam de longe neniel plu haveblaj.



Prof. J. B. Mello e Souza parolas en Kolegio Petro II.

8) *Libroservo* — La Libroservo de nia Landa Asocio disvendas ĉiujn haveblajn alilandajn eldonaĵojn, kiujn ĝi akiras per aĉeto aŭ intersaĝo. Pongeti Editora estas komisiita disdoni librojn por vendado tra la tuta lando.

9) *Eldonado* — Sola aŭ kun la helpo de diversaj institucioj, kiel la Brazilia Instituto de Geografio kaj Statistiko, Ministerio de Edukado, Universitato de Bahia, Brazilia Spiritisma Federacio, k.a., BEL jam eldonis ĉirkaŭ centon da libroj. Lastatempe ĝi starigis la "Eldonan Fondadon", kiu jam publikigis la verkojn: "Esperanta-Portugala Proverbaro", "Karlo" (3-a brazila eldono), "Esperanto em 20 Lições" (7-a eldono, 10.000 ekzempleroj). Pretaj por preso estas: "Dicionário Português-Esperanto" (2-a eldono), "Vocabulário Esperanto-Português e Português-Esperanto" kaj deko da aliaj libroj.

10) *Poŝto kaj telegrafo* — Jam en 1906 per iniciato de Brazilia Klubo "Esperanto" nia lingvo estis agnoskita kiel klara lingvo por internaj telegramoj. Brazilo estis la unua lando kiu faris tion. Poste, en 1925, la Internacia Telegrafa Unuiĝo, plenumante sugeston de la Ligo de Nacioj, faris saman decidon por la internacia telegrafado.

11) *Universala Esperanto-Asocio* — Ĉiam estis tre amikaj la rilatoj inter BEL kaj la universala instanco de la esperantistoj. Dank'al la alta nombro de brazilaj membroj nia lando havas du komitatanojn en UEA.

12) *Akademio de Esperanto* — D-ro Carlos Domingues estas la brazila reprezentanto de la portugala lingvo en la Akademio de Esperanto. El la 45 akademianoj nur li ne apartenas al la Malnova Mondo.

13) *Leĝoj* — Multaj brazilaj leĝoj, ĉu komunumaj, ŝtataj aŭ federaciaj, temas pri Esperanto. Gravaj freŝdataj estas tiuj el Ŝtatoj São Paulo kaj Guanabara, enkondukantaj Esperanton en niajn mezgradajn lernejojn. Menciinda estas la interpreto donita de la Federacia Konsilantaro de Edukado al la Leĝo pri la Direktlinioj kaj Bazoj de la Edukado, laŭ kiu la lingvo internacia estas konsiderata eduka praktiko. Sekve de tiu decido 27 gimnazioj jam instruas Esperanton.

14) *Kongresoj de Esperanto* — Kun la helpo de la lokaj samideanoj BEL jam organizis 19 landajn kongresojn de Esperanto, vizititajn ne nur de esperantistoj, sed ankaŭ de granda publiko. En preskaŭ ĉiuj UK nia lando reprezentigis ĉu de esperantisto ĉu de diplomato. Zorge studata estas la organizo de UK en Brazilo.

15) *Kursoj de Esperanto* — Bone funkcias la kursoj per korespondado. Por membroj MA kaj MS respektive la supera kaj la profesora kursoj estas senpagaj.

16) *Diplomoj de la Akademio* — Lastan jaron BEL disdonis 142 diplomojn nome de la Akademio de Esperanto, al kiu ĝi transpagas kotizojn.

17) *Kotizoj* — BEL ankaŭ transpagas al la internacia Movado la pli grandan parton de la ricevita kotizoj.

18) *Sidejo* — BEL okupas neordinare ampleksan sidejon (209 m²), apartenantan al la Federacia Registaro. En la sama konstruaĵo funkcias tri aliaj kulturaj societoj. De 1909 nia Landa Asocio estas gastigita de la Brazilia Societo de Geografio, kiu certe rezervos apartajn ejojn por BEL en la plano de difinitiva sidejo, konstruota en Esplanada do Castelo.

19) *Konkludo* — Malgraŭ la du gravaj naturaj malhelpoj, kiujn la Esperanto-movado trovas en nia lando, — la ne alta ĝenerala kulturo kaj la unueco de la nacia lingvo en teritorio kvazaŭ kontinento, krom ĝia simileco al lingvo de la najbaraj popoloj — la evoluo de nia Movado en Brazilo estas sufiĉe kontentiga.

Poste Gen. Geraldo Pádua faris du proponojn, kiujn aprobis la kunsidantoj:

a) Ĉiu loka grupo enkonduku en sian urban telefonlibron la vorton Esperanto kun numero de telefono, per kiu eksteruloj ĉiam povos informiĝi pri la tiea Esperanto-movado kaj interkonatiĝi kun la lokaj samideanoj.

b) La lokaj grupoj konsideru siaj membroj dum restado en la respektivaj urboj la vizitantajn samideanojn, kiuj prezentos la membrokarton de UEA kun kvitanc-marko por la fluanta jaro.

Tiam la simpatia F-ino Edina de Barros Reis korelverse kaj emociĝe parolis pri sia streĉa avido al perfekta kunfratiĝo kaj kunlaborado inter ĉiuj esperantistoj. Fortan aplaŭdon ŝi ricevis. Prof. Paulo Amorim Cardoso varme subtenis nian samideaninon.

Posttagmeze la kongresanoj estis akceptitaj de BEL en ĝia vasta salono por vere interamikiga kunveno. Eble la ekinvadanta nostalgio pro la baldaŭa disiĝo klarigas, kial la esperantistoj tiel intime, fratece ja, ĉion faris por plej profunden firmigi la radikojn de la altvaloraj amikecoj ekestintaj dum la Kongreso. La tablo, tute kovrita per frandaĵoj kaj glaciaj trinkaĵoj — kiel varma estis la temperaturo! — videbligis, ke tre delikataj kaj lertaj virinaj manoj preparis la vere familian akcepton. Simboloj de la 40-a Jarcento de Rio de Janeiro kaj de Esperanto efikis por memoriĝi, ke la esperantista festo estas omaĝo al la “mirinda urbo”.

Je la 20-a kaj duono en Palaco de Kulturo okazis la Ferma Kunsido sub prezidado de Prof. D-ro Pedro Calmon,

rektoro de la Universitato de Brazilo. Sidiĝis ĉe la estrara tablo D-ro Carlos Domingues, prezidanto de BEL, Prof. D-ro Júlio Cesar de Mello e Souza, Prof. D-ro J. B. Mello e Souza, Deputito José Bonifácio Diniz de Andrada, Prof. Antenor Nascentes, Ambasadoro Rui Píñheiro Guimarães, Gen. Geraldo Pádua, kongresa prezidanto, kaj S-ro Luiz Alberto Martins, ĝenerala sekretario de la Kongreso. La reprezentantoj de najbarlandaj kaj lokaj Esperanto-movadoj okupis la unuan vicon de la seĝoj.

Kun emocio la kongresanoj honoris la memoron de la gesamideanoj mortintaj depost la lasta Brazila Kongreso de Esperanto: Sebastião Carneiro de Campos; Carlos Shalders (1963) D-ro Miguel Timponi (1964), Aloísio C. dos Santos Melo (1964), Wanda Siedlecki (1964), D-ro Luis da Costa Ferreira Pôrto Carreiro Neto (1964) Prof. Hideo Yagi (1964), Benjamin Camozato (1964), Nice Ohlson Gramardelli (1965) kaj Prof. Edith Wehrs (1965).

La Prezidanto de la Solena Kunsido transdonis al S-ro Deputito José Bonifácio Diniz de Andrada diplomon de Honora Membro de BEL pro liaj grandaj servoj al la Esperanto-movado, kiel aŭtoro de la projekto, poste dekreto, enkondukanta la instruadon de Esperanto en la lernejoj de Guanabara.

La venkintoj en la konkursoj de la XIX-a Brazila Kongreso de Esperanto kaj de BEL ricevis siajn premiojn:

a) Oratora Konkurso: D-ro Carlos Doin S-ro Amarílio H. de Carvalho kaj Prof. Paulo Amorim Cardoso.



Omaĝo de la Kongreso al B.E.L.: Horo kaj Orkestro en la Nacia Lernejo de Muziko prezentas la imponan apoteozon “Alvoko en Defendo de la Patrujo”.

ALBERTO COUTO FERNANDES

VERKAJO DE PROF. D-RO CARLOS DOMINGUES

LEGITA DE S-RO LUIZ ALBERTO MARTINS EN OMAÇA
KUNVENO DE LA 23-A DE OKTOBRO

"Eĉ guto malgranda, konstante frapante,

Traboras la monton granitan."

Couto Fernandes amis ripeti tiujn versojn de La Vojo, kiuj perfekte difinas la poresperantan agadon.

La tuta historio de la Esperanto-Movado en Brazilo estas intime ligita al la vivo de Alberto Couto Fernandes. Fakte li gvidis kaj direktis la Movadon preskaŭ de la komenco de la organizita laboro ĝis sia morto.

Tamen al ne antaŭsciiginta persono, kiu legos la kolekton de "Brazila Esperantisto", aŭ konsultos nian riĉan arkivon de gazeteltranĉaĵoj, tiu vero ne montriĝos unuavide evidenta tial, ke lia

nomo ne aperas tiel ofte, kiel tio devus okazi, se ni konsideras, ke li ĉeestis kaj agis ĉe ĉiu okazaĵo de la brazila Esperanto-vivo.

La kialo de tiu neordinara silento estis la ega modesteco de tiu eminenta viro, kies leciono pri simpleco kaj malfiereco devas esti modelo por ĉiuj veraj esperantistoj.

Sed multaj el la samtempuloj de Couto Fernandes povis kaj ankoraŭ povas atesti pri la mirinda laboro de tiu sindona samideano, kiun la ŝatata ĵurnalistoj Domingos Barbosa prave nomis "senbrua kudromaŝino".

Inter tiuj samideanoj mi havis la feliĉon kaj honoron esti enkalkulita. Mi



Deputito José Bonifácio Diniz de Andrada ricevas la diplomon de Honora Membro de B.E.L.

b) Traduko-konkurso: S-ro Helmuth Schenck, Gen. Naylo Jorge da Cunha.

c) Konkurso Inter Gimnazianoj: F-ino Vanir Lalinda Martins Robaina kaj F-ino Maria Helena da Silva.

Prof. D-ro Júlio Cesar de Mello e Souza, la famkonata Malba Tahan, festparolis al la kongresanoj, klarigante per trafaj kaj spritaj vortoj la motivaĵon, kial la lingvo internacia ankoraŭ ne atingis pli gravan disvastiĝon en la mondo, kvankam estas neniam dubo pri ĝia alta valoro. Li klare bildigis la karakterizan inerton de la homaro.

Per bela parolado Prof. D-ro Pedro Calmon esprimis sian favoron kaj admiron al Esperanto kaj al la Esperanto-movado. La kongresanoj starigis kaj sinsekve aŭskultis la Nacian Himnon kaj "La Espero", respektive salutante la patrujon kaj la tutmondan esperantistaron.

akompanis Couto Fernandes ekde 1919, kiam mi translokiĝis al Rio de Janeiro, kaj mi estis vicprezidanto kun li dum 20 jaroj.

Je la unua fojo la nomo de Couto Fernandes aperas en nia afero okaze de la fondo de Brazila Klubo "Esperanto" en 1906. Li subskribis la faman liston zorge konservatan en la sidejo de la Klubo. Li ne estis membro de la unua estraro, sed tuj vigle eklaboris per la instruado de Esperanto.

Kvankam li tute ne estis sintrudema, li estis jam elektita prezidanto de Brazila Ligo Esperantista en 1910, kiam la unua prezidanto Prof. Everardo Backheuser, estis vokita al aliaj aktivecoj for de la Movado.

Ni povas aserti sen ia suspekto pri flato, ke nia Movado ŝuldas precipe sian ekzistadon al tiuj du noblaj viroj. Backheuser estis la brila profesoro kaj la entuziasma kaj entuziasmiga oratoro. Pro lia influo kaj pro la apogo de elstaraj personoj, kiujn li altiris al Esperanto, la Internacia Lingvo povis esti de la komenco ĝenerale konsiderata kiel serioza afero, male de tio, kio okazis en aliaj landoj, kie oni emis ŝerci pri nia idealo.

Eble la agado de tiu brila oratoro ne estus estinta konstanta. Kaj venis feliĉe la persistemo kaj la konstanteco de Couto Fernandes, kiu dum preskaŭ kvardek jaroj prezidis majstre nian Ligon, metante la fortajn bazojn, sur kiuj ĝi kuŝas, kaj tiel farante malpli peza, nian hodiaŭan taskon.

Couto Fernandes portis al la gvidado sian absolutan honestecon, moralan kaj materialan, kaj tio efikis al la bona famo, kiun ĝuas nia Ligo kaj Esperanto.

Ŝajnas, ke de la komenco de la Movado Esperanto forte interesis la ingénieurojn, probable pro la kvazaŭ matematika strukturo de la lingvo. Backheuser, Couto Fernandes, Nerval de Gouveia, Mota Mendes kaj Tobias Leite estis ingénieuroj. Ili lernis la regulan lingvon kaj restis fidelaj al ĝi, vigle laborante por ĝia divastigo.

Couto Fernandes agadis por Esperanto en ĉiu maniero. Kiam temis pri nia afero, li ne elektis taskon.

Preskaŭ la tuta "Brazila Esperantisto" estis preparita de li kun la kunlaboro de malmultaj sindonaj samideanoj, in-



La Familio de Couto Fernandes ĉeestas la omaĝon al nia granda pioniro.

ter kiuj Venâncio da Silva kaj Caetano Coutinho.

Li estis la ĉefa organizanto de la Brazilaj Kongresoj. Li pensis pri ĉio: la programoj, la invitoj, la organizaj komitatoj, la deziresprimoj. Ĉion li antaŭvidis, por ke la Kongresoj estu brilaj, kio efektive ĉiam okazis.

Plej zorge li traktis pri la reprezentado de Brazilo en la Universalaj Kongresoj. Li klopodis, por ke ĉiam estu delegito, ĉu iu esperantisto, ĉu diplomato. Li mem neniam volis ĉeesti tiajn kongresojn por kio li havis favorajn cirkonstancojn.

Kursojn ĉiuspekajn li gvidis — elementajn, superajn, per korespondado. Jam maljuna, li gvidis konstantan porinfanan kurson en lernejo "Rodrigues Alves" kaj estis emocie vidi tiun afablan maljunulon inter tiom da malkvietaj infanoj.

Kvankam li ne estis natura oratoro, li fariĝis varma parolanto en necesaj okazoj.

Ne nur pri la divastigo de Esperanto interesiĝis Couto Fernandes. Li lernis ĝis funde la lingvon, kiun li majstre regis. Tial li estis dum multaj jaroj Lingvakomitatano, respektata en la tuta mondo esperantista.

Bonaj verkoj atestas lian meriton:

"Curso de Esperanto", en kunlaboro kun H. Mota Mendes;

"Esperanta Radikaro kun Portugala Traduko" (4 eldonoj);

"Amo per Proverboj" (2 eldonoj);

"Dicionário Português-Esperanto", en kunlaboro kun Pôrto Carreiro Neto kaj Carlos Domingues;

"Dicionário Esperanto-Português" en kunlaboro kun Carlos Domingues;

"O Rádio em 16 palestras", en kunlaboro kun Carlos Domingues.

"Tipoj kaj Aspektoj de Brazilo", en kunlaboro kun diversaj tradukintoj.

Krom tio li verkis diversajn broŝurojn, kiuj aperis sen la nomo de la aŭtoro aŭ tradukinto, kaj korektis au reviziis multajn verkaĵojn.

Post lia morto nia eminenta samideano Teixeira de Freitas decidis eldonigi ĉe Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko iun verkon de Couto Fernandes. Kun la permeso de la vidvino ni traserĉis la tutan paperaron de nia karmemora amiko cele al trovo de la traduko de "A Moreninha" de Macedo, laboraĵo, kiun, laŭ mia scio, li estis farinta. Sed mi ne sukcesis trovi la kameron. Kio okazis al ĝi? Ĉu ĝi perdiĝis sekve de pruntedono aŭ pro alia kaŭzo, aŭ ĉu li detruis la verkaĵon, kiu estis farita en la unuaj tempoj kaj ne plu kontentigis lin?

Sendube la komprenebla manko de monrimedoj malhelpis la presadon de la verko tuj post la farado. Kvankam en tiu tempo la prezoj estis malaltaj, oni tre malfacile sukcesis havi monon eĉ por negrandaj libroj, kaj oni devis multe heziti antaŭ ol eldoni ion. Ni devis do rezigni pri "A Moreninha" en la traduko certe farita de li.

Tamen mi trovis inter la paperoj gravan verkon, kiu prezentas ankaŭ filologian intereson. Couto Fernandes iam estis ŝaradisto kaj tre amis la proverbojn. Tial li ne nur tradukis la komedion de Artur Azevedo "Amor por Anexins" sed ellaboris libron bazitan sur la Proverbaro, de Zamenhof, kaj kun la samsencaj proverboj en la portugala lingvo. Tiun grandvaloran verkon ni prezentis al I.B.G.E., kiu promesis eldoni ĝin kune kun la 3-a eldono de "Amo per Proverboj". La libro estos riĉa donaco al la tutmonda esperantistaro pro

la duobla merito, kiun prezentas verko samtempe de Zamenhof kaj de Couto Fernandes.

La senkompara modesteco de Couto Fernandes montriĝas en liaj verkoj. Ĝenerale lia nomo ne aperis sola sur la koverto. Li ĉiam volis dividi kun iu samideano la plezuron verki ion por Esperanto. Tial liaj verkoj ordinare havis kunlaborantojn.

En la Lingva Komitato li montris saman modestecon. Li proponis Backheuser por akademiano kaj kiam li volis, ke du amikoj estu akceptitaj en la Lingva Komitato, li decidis ekŝigi por lasi vakantan postenon.

Koncerne "Brazilan Esperantiston" li sukcesis konvinki min, kiel malnovan ĵurnaliston, ke mi fariĝu respondeca redaktoro laŭ la leĝo pri gazetaro.

Unu el la trajtoj de Couto Fernandes estis la egala humoro. Kiam hazarde li ekscitiĝis iom, li nur tordis rapide butonon de la veŝto.

Tiun egalan humoron li montris al la esperantistoj, kiuj longe malaperis de niaj vicoj. Kion oni scias, la aktiveco de la plimulto de la esperantistoj estas intermita — Ili venas kaj reiras, Ili aperas kaj malaperas — pro kompreneblaj kaŭzoj, tial, ke evidente ĉiu devas perlabori sian vivon kaj ĉiuj havas proprajn problemojn solvendajn. Couto Fernandes akceptis tiujn forkurintojn kun ĝojo, eĉ pli granda, ol se ili neniam estus malaperintaj. Li salutis la revenanton kun feliĉa rideto: "Ho! jen la malŝparema filo!"

En la unuaj jaroj Couto Fernandes kutime portis kuracistan valizon, en kiu li havis informan materialon por konvinki ĉiujn personojn. Pri tiu valizo mi kopias spritan pecon el raporto skribita de Melo e Sousa pri la vespermanĝo okazinta la 7-an de Junio 1910.

"Terure, timiga estas la valizo de D-ro Couto Fernandes. Ĉio kio rilatas esperanton, ne nur en Brazilo, sed ankaŭ en la tuta mondo.

En Eŭropo, Ameriko,

En Azio kaj Afriko

En Sergipe, en Pará,

En Cascadura aŭ Jacarepaguá, ĉio, unuvorte troviĝas en la valizo de D-ro Couto Fernandes."

Mi opinias, ke en estontaj jaroj, kiam oni faros tie ĉi grandan ekspozicion de memorindaj esperantaĵoj, tiu valizo rajtas okupi plej honoran lokon.

D-ro Bahkeuser eĉ verkis pri tio la jenan versaĵeton:

"Estas granda movad' en Londono,
En Berlin, en Bruĝel' en Parizo...

Sed en Rio, nenion mi vidas;

Ĉion kaŝas la Cout'a valizo.'

Feliĉe la esperantistoj plene komprenis la signifon de Couto Fernandes por nia Movado. En multaj okazoj li ricevis tute justajn honorojn. Li prezidis la II-an Brazilan Kongreson, en São Paulo. Oni inaŭguris lian portreton en la sidejo de B.E.L., en 1923. Oni daŭre reelektis lin prezidanto de B.E.L., ĝis en 1936 li estis akklamita Dumviva Prezidanto: tiu estis tre trafa decido, ĉar en kulturaj movadoj, kiel la nia, la kontinueco de la direktado evidentiĝas ordinarne konsilinda kaj utila.

Couto Fernandes naskiĝis en São Luiz, Maranhão, en la 23-a de Oktobro 1871. Kiel multaj nordbrazilanoj, li venis juna Rio-n por fariĝi armea oficiro. Li enmatrikuliĝis en la Militlernejo en 1889. Tie li partoprenis en la respublikamovado. En la sama jaro li forlasis tiun lernejon por studi inĝenierarton. Diplomito en 1894 de la Centra Lernejo, kaj eĉ antaŭe, li laboris en kelkaj publikaj laboroj kaj fine en la Ĝenerala Oficejo de la Telegrafoj, kie li plenumis kelkfoje la oficon de Ĝenerala Direktoro

Kompetenta kaj diligenta li estis, kaj pro tio ĝenerale respektata. Tio altranga situacio kreis al li konsiderindan influon, de kiu kompreneble ankaŭ profitis ofte la Movado. Eĉ post emeritiĝo en 1933 li konservis grandan rondon da amikoj, kiuj utilis al Esperanto.

Esperanto plenigis la vivon de Couto Fernandes. Kvankam li provis diversajn aliajn kulturajn aktivecojn, la Esperanto-Movado estis sendube lia vera medio. Li amis la esperantistojn kaj estis amata de ili.

Li mortis en la 21-a de Aprilo 1946. Lia morta malsano ne estis longa kaj tial li feliĉe ne konis la kadukecon, tiun teruran staton de la homvivo. Li falis unu fojon kaj por ĉiam.

Sed en tiu mallonga periodo — unu monato — lia penso estis plena de Esperanto. Sub la oksigena tendo li parolis pri nia lingvo kaj varme volis interrilatiĝi kun la aliaj estraranoj de B.E.L. por doni klarigojn kaj instrukciojn.

Lia morto konsternis la brazilan esperantistaron. Oni prave povis timi, ke nia Movado tute ĉesos en Brazilo, same kiel okazis en Ĉilo pro la morto de Sepúlveda Quadra, kaj en Peruo. Nia Movado multe dependas de la instiganto, kaj kiam ĉi tiu malaperas ankaŭ la laboro ĉesas. Kelkaj samideanoj tuj komprenis la grandegan danĝeron kaj streĉis siajn fortojn: Irani Baggi de Araŭjo, Caetano Coutinho, Maria do Amaral Malheiro, Getúlio Soares de Araŭjo, precipe pretiĝis helpi al la eventuala nova prezidanto, kaj tiel la brazila Movado daŭris sub la konstanta inspiro de la agado de Couto Fernandes, kiun ni sekvis seninterrompe por certigi al nia lando ĝian elstaran pozicion en la mondo esperantista. Aliaj kuniĝis al tiuj batalantoj de la unuaj malfacilaj horoj, kaj ni venkis la danĝeron.

Strato en la urbparto Laranjeiras, kie li loĝis kaj mortis, memorigas lian nomon al la urbanoj en Rio de Janeiro. Ankaŭ en São Luiz, naskiĝurbo, ekzistas strato kun lia nomo.

Sur la tombo de Couto Fernandes en la tombejo Sankta Johano la Baptisto estas skribajo Esperanta, eltirita el la himno La Espero:

"Sub la sankta signo de l'espero

Kolektiĝas pacaĵ batalantoj."

Denove ni kunvenas hodiaŭ en brila festo por kalkuli la rezulton de la laboroj en 50 jaroj. Sendube tiu rezulto estas granda, ne nur relative al la cirkonstancoj, sed ankaŭ en absoluta senco.

Kun plena justeco ni povas, devas kaj volas proklami, ke, se ni ĝuas tiujn fruktojn, ni multon ŝuldas al nia karega Couto Fernandes, kiu amis ripeti:

"Eĉ guto malgranda konstante frapante, Traboras la monton granitan."

PRIVILEGIA VOJO


V. Setälä

O livro recomendado pela U.E.A. para o ensino universal pelo método direto. Com folha suplementar de instruções em português. Ilust. Cr\$ 2.500

KONKURSO DE TRADUKO

ĈIUJ TIPOJ DE PEJZAĜOJ

Érico Veríssimo



Gen. Naylo J. da Cunha

En la solena ferma kunsido de la 18-a Kongreso estis anoncita la rezultado de la Konkursado de Traduko, starigita en la n-ro de Januaro-Marto de la kuranta jaro de BRAZILA ESPERANTISTO.

Partoprenis ses konkursantoj, kiuj sin kaŝis sub la pseŭdonimoj *Plótino*, *Isócrates*, *Dokito*, *Esperantujano*, *Regios*, *Nhambiquara* kaj *Smeraldo*.

La juĝa komisiono opiniis, ke ĉiuj verkaĵoj estas bonaj kaj pro tio gratulis la konkursantojn. Post atenta komparo ĝi konkludis, ke du reliefigas egale, tiuj de Esperantujano kaj de Nhambiquara; ĝi do proponis ilin por la unua loko.

Post malfermo de la kovertoj, oni konstatis, ke la tradukaĵoj estas de S-ro Helmuth Schenk kaj de Generalo Naylo Jorge da Cunha. Ĉar la unua jam estis premiita en antaŭa konkurso, la komisiono opiniis, ke la tradukaĵo de Gen. Naylo Jorge da Cunha estu publikigita. Jen ĝi:

La panoramo estas vere impresa, ĝi retenas la spiradon de la observanto. Inter la montaroj kaj la maro, konturante la montojn, preterirante la golfeton, al kies enirejo postene staras la monto Sukerpano, la urbo sterniĝas malviglece, sin disŝutante al ĉiuj kvadrantoj. Ĝi havas preskaŭ ĉiam ian foiran etoson. Se ĝi estus dekoracio pentrita, oni povus diri, ke la artisto trouzis la scenajn lumefektojn de la koloraro, kunigante arbitre en unu sola pejzaĝo, la tutan multkoloran belecon, kiun Dio zorge disverŝis ŝpareme sur la tersupraĵon.

La akvaro de la golfeto estas kvazaŭ smeraldo trankvila, makulita de insuloj, barkoj, lanternoj, buoj, veloĵoj... Super ĝi flugas mevoj kaj aviadiloj; kaj ne malofte krucigas la ĉielon, kiantaj akresone, verdaj bandoj da papagoj. La malavara suno disjetas sur la akvojn plenmanojn da ormoneroj. Kaj en kelkaj tagoj, iu blulumea nebulo, kun delikataj rozkoloraj nuancoj, ŝvebas en la aero, kvazaŭ la urbo estus ia ludilo volvkovrita per celofanpapiro.

Kiel lerni la nomojn de la senfinaj montaroj?

Kiel priskribi iliajn konturojn? La lumo ŝanĝas petoleme la formon kaj la koloron de ĉi tiuj montegaroj. Nokte, ni enlitigas, konvikitaj, ke ni scias parkere la siluetojn de tiuj ŝtonmuregoj, kaj en la morgaŭa tago, ni vekigas kun la ne atendita elreviĝo malkovri, ke ĵus naskiĝis nova montpinto, nova montvico, aŭ ke dumnokte iu malica nevidebla skulptisto estis laboranta, celante aliĝi la pejzaĝon, aŭ al ĝi aldoni novan mirindajon. Kelkajn tagojn la nuboj kovras la montpintojn aŭ improvizas plumojn, perukojn kaj vualojn por la montegkapoj. La aero odoras sunon, maron kaj arbaron. Kiu alvenas al Rio, tiu estas tuj prenita de ia etoso el festa tago, de ia prekaŭ idolana sento, kvazaŭ, subite, ĉiuj liaj internaj ombroj fordisiĝus, sub la influo de ĉi tiu varma suno kaj de ĉi tiuj parfumoj. Ĉar ja ekzistas magio kaj muziko en la aero, kareso en la vento, luma mistero en la urbo Sankta Sebastiano de Rio de Janeiro.